

Theodor Storm,  
Profundaj ombroj, 3

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Post la morto de lia unua edzino Konstanco ekkaptis la poeton teruro antaŭ „tiu eterna dezerta estonteco“, vidalvide de ammalplena, senfeliĉa ekzistado, pri kiu neniu kredo je rekuniĝo en la transo povas konsoli. Lapide kaj dure, ne uzante la de li alitempe preferatan kantformon, la poeto parolas pri tiu nova sperto:*

Samkiel jena fatamorgano de la dezerto  
Petolas antaŭ mi  
La penso pri senmorteco;  
Kaj en la pala nebulo de l' malproksimo  
Ĝi trompe montras al mi vian bildon.

Ege doloriga spiro de sopiro,  
Sveniga espero min kaptas;  
Sed mi levas min pene;  
Al vi, al vi;  
Ĉiu tago estas paŝo al vi.

Sed, rigora lumo eniĝas;  
Kaj antaŭ mi ĝi etendiĝas,  
Dezerte, plena da teruro kaj soleco;  
Tie, fore, mi antaŭsentas la abismon;  
En ĝi la nenio. –

...

Theodor Storm,  
Tiefe Schatten, 3

*Nach dem Tod seiner ersten Ehefrau Constanze ergriff den Dichter der „Schauder vor dieser ewig öden Zukunft“ angesichts eines liebeleeren, glücklosen Daseins, dem kein Glauben an eine Wiedervereinigung im Jenseits Trost geben konnte. Lapidar und hart, ohne die sonst von ihm bevorzugte Liedform zu benutzen, spricht er von dieser neuen Erfahrung:*

Gleich jenem Luftgespenst der Wüste  
Gaukelt vor mir  
Der Unsterblichkeitsgedanke;  
Und in den bleichen Nebel der Ferne  
Täuscht er dein Bild.

Markverzehrender Hauch der Sehnsucht,  
Betäubende Hoffnung befällt mich;  
Aber ich raffte mich auf,  
Dir nach, dir nach;  
Jeder Tag, jeder Schritt ist zu dir.

Doch, unerbittliches Licht dringt ein;  
Und vor mir dehnt es sich,  
Öde, voll Entsetzen der Einsamkeit;  
Dort in der Ferne ahn ich den Abgrund;  
Darin das Nichts. –

...

Sed pluen kaj pluen  
 Trenas mi min  
 De tago al tag',  
 De monat' al monat',  
 De jaro al jar';

Ĝis mi finfine  
 Elĉerpita je l' vivo kaj sen espero  
 Falos suben ĉevoje  
 Kaj la malnova eterna nokto  
 kovros min kompate,  
 Kune kun ĉiuj revoj kaj sopiroj.

*Traduko de la Germana poemo "Tiefe Schatten, 3" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2002-04-14.*

MR-385-1 / Arg-790-1583 (2013-01-22 16:33:44)

*Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff) en 2002-04-13/14 laŭ la origina, germanalingva teksto, kiu aperis en la libro „Theodor Storm“ de Regina Fasold, el la serio Bild-Biographie, eldonita de la eldonejo VEB Bibliographisches Institut Leipzig, en 1990, ISBN 3-323-00196-6. El tiu libro estas pre-nita ankaŭ la supra klariga teksto.*

Aber weiter und weiter  
 Schlepp ich mich fort;  
 Von Tag zu Tag,  
 Von Mond zu Mond,  
 Von Jahr zu Jahr;

Bis daß ich endlich,  
 Erschöpft an Leben und Hoffnung,  
 Werd hinstürzen am Weg  
 Und die alte ewige Nacht  
 Mich begräbt barmherzig,  
 Samt allen Träumen der Sehnsucht.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04).*

Arg-790-1582 (2013-01-22 16:31:42)

*Das Gedicht ist abgedruckt in dem Buch „Theodor Storm“ von Regina Fasold, aus der Serie „Bild-Biographie“, herausgegeben vom Verlag VEB Bibliographisches Institut Leipzig, in 1990, ISBN 3-323-00196-6. Aus diesem Buch ist auch der obige erklärende Text entnommen.*